

# LA VERDA STELO



Esperanto  
Nederland

sekcio  
Groningen-  
Drente

decembro 2004



## LA VERDA STELO

eldono de Esperanto-klubo Groningen-Drente,  
sekcio de ESPERANTO NEDERLAND

- Prezidanto** s-ro J.S. Swenker  
T.W.S. Mansholtstraat 25  
9728 MC Groningen  
tel. 050 527 45 72
- Sekretariejo** s-ino W. van Ganswijk-Vlasblom  
Huygensstraat 27  
9727 JA Groningen  
tel. 050 525 00 86
- Kasisto** s-ro L. Staghouwer  
Julianalaan 25  
9781 ED Bedum  
tel. 050 301 40 15



- Kunvenejo** Dreesflat, W. Dreesstraat 1  
ĉiun alternan ĵaudon ni kunvenas  
de la 19h45 ĝis la 21h45
- Esperanto-centro** T.W.S. Mansholtstraat 25  
9728 MC Groningen  
J. Swenker, tel. 050 527 45 72
- Redakcio** Koos Scharroo,  
Wil van Ganswijk-Vlasblom

## Karaj legantoj,

**P**or ke la klubo daŭre povu ekzisti, ne funkcias nur estraranoj. Estas inter alie ankaŭ redakcio kaj gratulservo. De kelkaj jaroj *Bets Dodebier* prizorgas la *Gratulservon*. Kiam membro de nia klubo havas sian naskiĝtagon, la Gratulservo sendas karton (kompreneble nur se ni scias la naskiĝtagon).

Antaŭ kelkaj jaroj la PTT havis televidan reklamon, en kiu oni diris *Karto: malgranda peno, granda ĝojo*. Montriĝas, ke la PTT pravas.

Antaŭ nelonge la kasisto ricevis ekstran pagon de unu el vi. Sur la pagilo estis

skribita: "Por *Limburgse vlaai* dum via venonta estrarkunveno (du pecojn por la skribintino de la gratulkarto)".

Koran dankon. Ni volonte akceptas ĉi tiun afablan geston. Dum klubkunveno ne nur la estraro (kaj Bets) estis regalitaj, sed ankaŭ la aliaj ĉeestantoj, do eble ankaŭ vi!

Per ĉi tiu sciigo ni *ne* volas instigi vin reagi sammaniere, por ke la estraranoj ne tro dikiĝu. Tamen ni vere aprezas ĉi tiun geston.

Luit Staghouver

## Naskiĝtagoj

### DECEMBRO

- 15 H. Molthoop  
P. Reddingius-van Houtum
- 21 H. Leeuwerke-Kiers
- 31 A. van der Heij

### JANUARO


- 4 W. van Ganswijk-Vlasblom
- 12 L. Broekema-Clemens Schroner
- 13 G. Lanooy-Nijlunsing
- 17 A.O. van der Wal
- 27 Ineke Emmelkamp
- 28 R.A. Haadsma
- 30 A.W. van der Veen

### FEBRUARO

- 11 H. van Kappen
- 17 A.A. Bellekom
- 18 S. Kok-Czeswinska
- 28 L.H. Staghouver

### MARTO

- 24 E.J. Begeman &  
H. Behr



## Klubvesperoj

### JANUARO

- 6 Poemoj
- 20 Ludvespero

### FEBRUARO

- 3 Jarkunveno
- 17 Claude Piron

### MARTO

- 3 Enigmoj
- 17 Atestoj kaj digitalaj subskriboj - *Johan Swenker*
- 31 prelegos Ziko Sikosek

### APRILIO

- 14 Historio pri *tai chi* kaj *chi kung* - *H. van Hogen-Cornelissen*
- 28 Lingvoj / helplingvoj / novaj projektoj

### MAJO

- 12 Hans Andersen - *vivo kaj fabeloj*
- 26 Ni kune manĝos



La temoj de la klubvesperoj estas diversaj, kiel vi povas konstati, do venu por informiĝi pri ili.




## Humuro

### En angla kafejo.

Nederlanda junulo sidas en angla kafejo. Du belaj junulinoj atente rigardas lin. "Nine", diras la bonstatura brunulino al sia blonda kunulino kun same belaj rondaj korpopartoj. La junulo memfide konstatas: "Naŭ el dek. Sendube tiuj karulinoj opinias min bela junulo."


La viro malantaŭ la bufedo flustras en lian orelon: "Allogaj junulinoj, ĉu ne? Ili estas el Germanio."



## Kio okazis en Groningen?

La 9-an de septembro 2004

**D**um la somerperiodo dufoje eblis renkonti aliajn klubanojn dum kafotrinkado. En la *Skandinavia Vilaĝo* kunvenis tri el ni, kaj en la *Schimmelpenninckdomo* ĉeestis kvin anoj. Ni agrable babilis pri Esperanto-okazaĵoj kaj pri personaj travivaĵoj.



La 9-an de septembro estis la unua kunveno post la ferioj. Kvankam la temo estis *ferioj* ni tute ne parolis pri tiu temo. Pri kio ni ja parolis kvinope? Pri tio, kion Fieke organizis, nome:

- tendaro en Appelscha,
- Esperantobudo por studentoj komence de la studjaro,
- kelkaj sciigoj de ŝi en *Dagblad van het Noorden*,
- la kurso, kiun ŝi intencas gvidi kaj
- la informebleco por Johan kaj ŝi en la urba biblioteko tri tagojn poste.

Venis laŭdoj por nia klubo el Epen kaj el Germanio. La klubo el Nijmegen anoncis por siaj anoj tagekskurson al Duisburg, kaj ili menciis la fordonadon de la libroj el sia biblioteko, ĉar neniu iam prunteprenas librojn, same kiel ĉe ni.

Ni aŭdis, ke du el la ĉeestantoj intencas partopreni la *Faulhabersemajnfino*. Wil iom rakontis pri siaj Interretkursanoj, kaj ni aŭdis de Koos, ke li okupas sin kiel helpanto/instruanto/korektanto ĉe la Esperanto-kursoj de *lernu!* en Interreto. Kiel premion de iu kvizo en la interreta babilejo de *ĝangalo.com* Koos ricevis muzikan KD-on.

Luit montris al ni la premion, kiun li ricevis el Ĉinio. Estas tre granda murtapiŝo belkolora. Johan regalis nin per tre bongustaj kukoj pro tio, ke li festis sian naskiĝdatrevenon.

Tre rapide forflugis la du horoj. Ni esperas bonvenigi pli da anoj venontfoje, ĉar tiam Ed Borsboom prelegos pri *Andreo Cseh*.

La 23-an de septembro 2004

**S**peciala gasto: *s-ro Ed Borsboom*, kiu prelegis pri la *Vivo de Andreo Cseh*. Entute ĉeestis 16 personoj.

Kion ni jam scias pri Andreo Cseh? Li instruis laŭ rekta metodo, havis ĉarman karakteron kaj regule renkontis doktoron Zamenhof. Andreo Cseh estis hungaro, sed apartenis al unu el la minoritatoj. Li estis pastro anstataŭ instruisto, estis sprita kaj parolema. Ofte



**Andreo Cseh**

ĉeestis centoj da kursanoj kiam li instruis Esperanton. Andreo Cseh spertis ankaŭ, ke en la granda Esperanto-familio ne ĉio estis 'rozodoro kaj lunlumo'. Oni diras, ke *Zamenhof kreis la lingvon, kaj Andreo Cseh la metodon instrui ĝin*. Estas homoj, kiuj asertas, ke la verbon *krokodili* enkondukis Andreo Cseh, sed laŭ Ed Borsboom tio estas bela historio, sed ne vera. Wim Rijnders, interreta kursano de Wil, kunportis malnovan vortareton (1930), kiun kompilis kursanoj de Andreo Cseh. Andreo Cseh naskiĝis en 1895 en Transilvanio (parto de la aŭstra-hungara regno)

kaj mortis 84-jara en Hago. Li estis entombigita proksime de la Riouwstrato, kie li dum multaj jaroj laboris. Kiel dekjarulo Andreo Cseh iris al Budapeŝto por studi juron. Pro la komenco de la 1-a mondmilito li reveturis hejmen. Ĉar ne estis alia eblo en la ĉirkaŭaĵo, li ekstudis en seminario, kvankam li tute ne intencis fariĝi pastro. Fakte, Andreo Cseh neniam laboris kiel pastro, sed post kiam li pastrigis tuj komencis instrui Esperanton. Post la fino de la 1-a mondmilito li multe veturis tra Eŭropo kaj instruis Esperanton en pluraj landoj.

Andreo Cseh venis en 1930 al Nederlando, ne ĉar tie estis multaj esperantistoj, sed ĉar tie loĝis la gesinjoroj Isbrucker, kiuj lin estis invitintaj. La urbestro de Arnhem, kiu estis favoranto al Esperanto, disponigis al Andreo vilaon por instruado de Esperanto. En Arnhem li instruis ĝis la komenco de la 2-a mondmilito.

*Vivo de Andreo Cseh* estas sprita libro.

"Ne ĉar mi skribis sprite, sed ĉar Andreo Cseh estis sprita kaj aminda homo", klarigis Ed Borsboom, kiu regule renkontis Andreon. Kiam Ed proponis al li verki libron pri lia vivo, Andreo opiniis, ke li skribu nur pri la anekdotoj.

Iu senkulpa ŝerco en 1935 preskaŭ estis la kaŭzo de ebla antaŭtempa morto de Andreo Cseh. Pro bonŝanco (atenta urbdoma dungito) la gestapanoj, proksimume sep jarojn poste, ne eksciis lian adreson, kiam ili venis por aresti lin.

Iam junulino diris al Ed Borsboom: "Vi parolas pri Andreo Cseh kvazaŭ li estis sank-

tulo. Ĉu li ne havis ecojn malbonajn?" Nu, ankaŭ tiajn ecojn li havis. Se oni interkonsentis rendezuon kun Andreo, oni ofte devis atendi 'iom' da tempo. Andreo ne faris ĉion regule kiel horloĝo. Li kredis ankaŭ je astrologio, kio estis malpermesata al pastro.

Ed Borsboom kun sia interesa prelego daŭre kaptis la atenton de sia aŭskultantaro. Andreo Cseh estas unu el la plej interesaj homoj de la Esperanta historio. La libro pri lia vivo indas, ke oni legu ĝin.

Antaŭ proksimume 20 jaroj Ed Borsboom iris al Madejro por libertempi. En la jarlibro li trovis adreson de Madejra esperantisto. Ed sendis al li leteron, ĉar li volis renkonti lin. Tiu Madejra esperantisto certe ne havas multajn eblojn paroli Esperanton, opiniis Ed. Bedaŭrinde ne venis respondo. Dum la libertempo Ed hazarde renkontis belgan esperantiston. Ankaŭ tiu belgo sendis leteron kaj ja ricevis respondon. La

belgo kaj la madejrano interkonsentis pri rendezuo. Ed akompanis la belgon al tiu rendezuo. Kiam Ed Borsboom demandis kial la madejrano ne respondis sian leteron, tiu diris: "Mi ne respondis, ĉar estas tiom da esperantistoj, kiuj venas al Madejro, ke mi ne povas renkonti ĉiujn. Ĉar mi jam renkontis multajn nederlandanojn, mi ne plu reagis al leteroj el Nederlando. Ĉiun merkredon mi renkontas esperantiston."

Kutime ni, la klubo, repagas al preleginto minimume ties vojaĝkostojn, sed Ed Borsboom faris la kondiĉon, ke la klubo aĉetu du ekzemplerojn de lia libro. De proksi-



**Ed Borsboom**

mume unu jaro ni ne plu havas libron. Kion ni faru kun tiuj libroj? Ne estis malfacile trovi bonan destinon por la du libroj. Ankaŭ nia klubo povas ekzisti nur ĉar estas homoj, kiuj pretas dediĉi parton de sia libera tempo al klubaj taskoj. Kelkaj el ili estas Petra kaj Henk van Kappen, kiuj dum pluraj jaroj prizorgis nian informilon, kaj Wil van Ganswijk. Kion diri pri Wil?

Estas facile: iu kiel Wil estas nemalhavebla al nia klubo. Kun plezuro ni donacetus la du librojn al ili.

La prelego de Ed Borsboom estis tiel interesa, ke ankaŭ pluraj ĉeestantoj aĉetis ekzempleron de la *Vivo de Andreo Cseh*. Interesa libro pri interesa persono!



**Ed kun sia aŭskultantaro**

*La 7-an de oktobro 2004*

**E**stis malferma vespero. Kiel kutime, ni antaŭe ne sciis, kiom da gastoj venos. Ĉi-jare ni komencis per unu gastoj, kiu jam iomete scias la lingvon. Ni decidis paroli Esperanton, por ke li povu lerni multe. Iomete poste venis dua gastoj, kiu estas lernanto de Fieke van der Veen, do ne vere estas eksterulo. Iomete poste venis geedza paro el Hoogeveen, kiu ne povis trovi nian salonon, do serĉis dum longa tempo. Ni aprezis ilian persiston. Laŭvice ĉiuj prezentis sin. La gastoj diris, kial ili venis kaj la membroj de nia klubo diris, kial ili esperantistiĝis. Tiel multaj

demandoj pri Esperanto jam estas responditaj antaŭ ol iu demandas ilin. Ni spektis *Mazi en Gondolando*. Wil iam aĉetis tiun vidbendan kurson, kiun havis ankaŭ Niza Kuiterman. El ŝia heredo ĝi estis donita al Fieke. La nederlanda vorto *mazzel* (bonŝanco) do venas de *Mazi* (laŭ Fieke).

Fine de la vespero Wil uzis por instrui Esperanton la *sekigŝnuran metodon*, kies grava eco estas, ke oni povas pendigi apartajn paperojn al ĝi. Do unue pendis nur la frazeroj *vendas-vendis-vendos*. Ŝi aldonis la *subjekton* kaj la *objekton*, por ke ni povu fari frazojn, kiel *la floristo vendas kukojn*. Iomete poste la sekigŝnuro

estis plena je frazeroj, per kiuj ŝi igis nin laŭvice fari frazon.

Fine ŝi ŝanĝis la lokon de kelkaj frazeroj. Tiam gravas, ke akuzativo havas la finaĵon *N*. Per la frazoj *mi salutas vin* kaj *vin salutas mi* finiĝis la instruado kaj la malferma vespero.

#### *La 21-an de oktobro 2004*

**W**il spertis mirigan okazaĵon. De ŝia filo ŝi ricevis la retadreson [www.esperantoXL.nl](http://www.esperantoXL.nl), kun kiu ŝi kontaktis, skribante, ke ŝi estas entuziasma esperantistino, kaj demandas sin, kio estas la rilato inter Esperanto kaj ĉi tiu entreprenno. Oni respondis: *EsperantoXL is een ICT-bedrijf, dat zich richt op het koppelen van computersystemen om de informatiestromen binnen bedrijven te verbeteren. Wij zien onze producten en diensten als een 'universele taal' voor computersystemen. Vandaar de keuze voor 'Esperanto' in onze naam. De grondslag voor ons bedrijf lijkt dus een beetje op de taal Esperanto, nl. ervoor zorgen dat men met elkaar kan communiceren. Wij beheersen het Esperanto niet, maar het lijkt ons wel een idee in de toekomst in PR en communicatie hiermee iets te doen.*

Bets kunportis kelkajn artikolojn el gazeto *Trouw*. Interalie pri *Een wereldtaal*, kiun verkis Marc van Oostendorp, kaj komento pri la ideo instrui anglalingve en universitatoj, verkita de angla sinjoro *Eric DICKENS*, kiu opinias, ke la nederlandanoj eble iĝu dulingvaj, kaj ke oni ofte ne konscias pri la diferenco inter la brita kaj la usona versioj de la angla.

La temo estis *William AULD*. Ĉiuj serĉis komputile, kaj trovis, ke li naskiĝis en 1924 en Skotlando, verkis multajn librojn,

poemojn kaj ankaŭ la studlibron *Paŝoj al Plena Posedo*. Nuntempe li loĝas en *Dollar*. Iam li estis piloto en flugmaŝino *Spitfire*.

#### *La 4-an de novembro 2004*

**N**i parolis pri la *Faulhaber-semajnfino*, kiun partoprenis 3 el la ĉeestantoj, kiuj estis tre kontentaj pri la programo. Joop Moonen raportis pri la Esperanto-kongreso en Bilbao, kie la temo estis *lingvo-diverseco*. Li laboris iam ĉe *Dow Chemicals*, kie oni oficiale parolas la anglan, sed fakte la *teksasan* dialekton. Al la kongreso en *Bulonjo ĉe maro*, kiun povos partopreni 500 personoj, jam aliĝis ĝis nun preskaŭ 400.

Fieke vd Veen sciigis, ke la *Nordnederlanda Esperanto-Junularo* invitas junulojn kune festi *Sanktan Nikolaon* en Groningen dum la semajnfino de la 10-a ĝis la 12-a de decembro.

La vestaĵoj, kiujn Niza kaj Wil uzis por la infangrupo, kiu iam estis invitita ĉeesti naskiĝdatrevenon de reĝino *Juliana ĉe Soestdijk*, eble trovas bonan destinon en *Institut Zamenhof*, la lernejo en Togo. Ni solvis anagramojn kaj ludis malfacilan kvizon, kiun Niza iam faris.

#### *La 11-an de novembro*

**E**stis kantisto en nia klubo. Li ne estis infano, kiu kantis pro Sankta Marteno, sed *Mikaelo Bronŝtejn*, kiun ni estis invitinta. Li vojaĝas tra Nederlando kaj aliaj okcidentaj landoj, kaj prelegas aŭ kantas. Ni petis lin kanti.

Venis sufiĉe da homoj (17 personoj). Kelkaj ankoraŭ ne konis unu la alian. Ni do unue rapide interkonatiĝis: 3 personoj venis de Frislando, unu de Alpnen a/d Rijn,



unu de Ukrainio, la aliaj de Groningen kaj Drente.

Post tio Mikaelo povis kanti. Li konas tiom da kantoj, ke li ĉie elektas aliajn. Tiel la muzika rondvojaĝo estas interesa ankaŭ por li. Oni ne povis konstati, ke li improvizas, ĉar li tiel lerte ligis unu kanton al alia. Li parolis ekz-e pri SEJM (Soveta Esperanto-Junulara Movado), kaj kantis pri tendaro dum kunveno. Poste li diris, ke SEJM devis pro-

pagandi, samkiel la ĉinoj propagandas pere de Esperanto. Ĉu tio estis vera aŭ ne, ne gravas. La sekva kanto, pri ĉinoj, kaŭzis al li diri tion.



**Mikaelo Bronŝtejn**

Inter la kantoj li pri ili lige babilis per tipe ukraina akĉento. Oni aŭdis proksimume *Esperantjisto venjis al nji*. Sed kiam li kantis, tiu akĉento estis for.

Li povas rakonti amuze. Drinki alkoholaĵojn estas malsana afero. Tial la ŝtato batalas kontraŭ la drinkado, sed tamen tiu venkas. Tial la homoj eltrovis sekretan lingvon. Ili diras *legi* anstataŭ drinki. Al kunvenoj la ĉeestantoj kunportas ion por 'legi'. Ekz-e *lernolibro* (t.e. seka vino) aŭ *klasikaĵo* (vodko). La sekva kanto temis pri 'legi' ĝis ebrio.

Sur lia tablo estis skatolo kun moneretoj. Li eksplikis, ke li ŝparis la tutan jaron por disdoni tiujn monerojn. Ni ĉiuj do rajtis

preni unu kopekon (centonon de rublo), kiel memorigaĵon pri ĉi tiu vespero.

*La 18-an de novembro 2004*

**W**iebren Akkerman menciis, ke Radio Frislando raportis pri Kajto, kiu gajnis premion, kaj aperigis novan KD-on. Koos raportis pri la studsemajnfino en Hoek van Holland, kie partoprenis pli ol 25 personoj en kvar grupoj, el kiuj estas unu por gejunuloj. En la grupo, kiun li partoprenis, oni parolis pri la nova eldono (t.e. la 2-a) de la instrulibro *Mil unuaj vortoj*. Oni modernigis la libron, ekz-e en la unua eldono oni parolas pri *glaciŝranko* kaj en la dua pri *fridujo*.

Ĉar li antaŭe diskutigis la teamon de *ler-nu!* pri la vortoj *komuniki*, *komunikiĝi* kaj *interkomuniki*, li petis konsilon de Rob Moerbeek, kiu gvidis la grupon. *Komuniki* estas verbo unudirekta, dum *komunikiĝi* kaj *interkomuniki* estas dudidirektaj. Rob preferas la vorton *interkomuniki*.

Ankaŭ Wim Rijnders, kiu jam kelkfoje aperis en niaj kunvenoj, partoprenis la studsemajnfinojn. Li komencis en la grupo por komencantoj, sed pro tio, ke li montriĝis tro kapabla por tiu grupo, li promociiĝis al pli progresanta grupo.

Dennis vd Heijden post kelkaj monatoj denove iros al Ganao, kie li loĝis kaj laboris du jarojn. Li intencas viziti ankaŭ la najbaran landon *Togolando*, kaj eble vizitos la lernejon *Institut Zamenhof*, kiu estis starigita tie helpe de esperantistoj.

Wil, Johan kaj Luit vizitos la geedzojn van Kappen por danki ilin pro la multjara kompilado de nia informilo.

Ni povos havi budon dum la kristnaska foiro en *Corpus den Hoorn*.

La temo estis *la evoluo de farmado en Nederlando*, pri kiu Wiebren detale kaj klare informis nin. La prelego estis dividita en tri partoj:

- la periodo tuj post la 2-a mondomilito
- la naŭdekaj jaroj, kaj
- la nuna situacio.

Per subvencioj kaj multegaj postuloj la registaro grave influis la evoluon kaj ĝiaj multaj direktivoj ne malofte ĝenas la farmistojn. Tamen, en la daŭro de la pasintaj jardekoj evoluigis la nivelo de la nederlanda agrikulturo al unu el la plej altaj en la mondo.

Rilate farmado Frislando estas pioniro multflanka: la enkonduko de la *Bredregistro* (stamboek), la kultivado de terpomoj, la unua apliko de artefarita ensemado en 1934, nova sistemo por konservi herbon pli seka en 1947, kaj la brutaro estas sen tuberkulozaj bakterioj de 1950.

La agrara negocado de Nederlando elstaras, kaj grave kontribuas al ties pli-malpli sana 'mastrumada kaslibro'. La diverseco de la agrara mondo grave kontribuas al sana medio.

Granda problemo estas, ke multaj farmistoj aĝas pli ol 50 jarojn sen havi sekvontojn. Pro tio ili ne plu investas, kaj la nunan situacion nur konservas. Se oni in-

tencas starigi farmbienon, oni bezonas multe da mono. Por farmbieno kun 100 bovinoj, kiuj produktas po 8500 kilogramojn da lakto jare oni bezonas 50 hektarojn da herbejo (€1.250.000), kompletan stalon (€ 500.000), produktorajtojn (€1.517.250), 80-ĉevalpovan traktoron (€40.000) kaj diversajn maŝinojn (€25.000). Entute oni do bezonas proksimume €3.500.000.

La moderna, altstatura bovino estas pli grava pro la laktoproduktado ol pro la vivando. Bonan bovinon oni povas melkadi dum kvin ĝis sep jaroj.

La kostprezo po kilogramo da lakto estas €0,44, kaj la enspezo nur €0,33. Estas klare, ke la nuna situacio ne estas favora al farmistoj. Oni daŭre farmas, ĉar ne ĉiuj enkalkulas ekzemple la mem investitan tempon.

Ni lernis kelkajn novajn vortojn:

*komasacio* (ruilverkaveling) kaj *plinoblighi* (veredelen).

Ni lernis ankaŭ, ke ne estas diferenco inter *ligboxstal* kaj *loopstal*. Same kiel homoj ankaŭ bovinoj ŝatas havi propran lokon. Kvankam bovino povas libere promeni tra la stalo, ĝi ofte reiras al la sama loko por kuŝiĝi.

## La Sep Mondomirindaĵoj.

La Dam-a palaco en Amsterdamo kelkfoje estas nomita la oka mondomirindaĵo. Sed kial la oka, kaj kiuj estas la sep antaŭaj?

En la pratempo 'sep' estis sankta nombro, verŝajne ĉar oni konis nur sep planedojn. En la Biblio oni renkontas la nombron 7 en

la sepbraka kandelingo, la sep sigeloj, la sep plagoj de Egiptio kaj la sep trumpetoj el Apokalipso.

Krom en la Biblio, ni parolas pri la sep etaĝoj de Babelturo, pri la sep saĝuloj de la grekoj, ktp. Por esti perfekta kaj harmonia ĉio devas konsisti el sep partoj, ne

pli. Pro tio do la sep Mondomirindaĵoj. En tiu pratempo oni konstruis multajn belegajn kaj imponajn konstruaĵojn kaj statuojn, sed kiuj el ili apartenos al la sanktaj Sep?

Kiam ni nun parolas pri la Sep Mondomirindaĵoj, oni tuj scias, ke estas jenaj:

### **1. La granda piramido de Keopso apud Kairo.**

**A**raba proverbo diras: La tempo venkas ĉion, sed la piramidoj venkas la tempon. Ĉar el la sep, la piramido de Keopso estas la ununura, kiu temp-eltenis. Ĝi estas 232 metrojn kaj longa kaj larĝa, dum ĝi havas la alton de 148 metroj. Por kovri tiun spacon per ŝtonoj, kiuj estas po unu metron kaj altaj, larĝaj kaj longaj, oni bezonis preskaŭ 54 kilometrojn da ŝtonoj. Ĉiu ŝtono havas la alton de unu metro kaj oni bezonis 148 metrojn. Estas vere, ke ĉiu pli alta tavolo estas ĉiam pli malgranda, sed tamen oni bezonis entute proksimume 3 milionojn metrojn da ŝtonoj, kune 200 milionojn da kilogramoj. Ĉi tiuj ŝtonoj estas hakitaj el la rokoj sur la orienta bordo de Nilo. Oni trenis ilin al la bordo, transportis ilin trans la riveron, denove trenis ilin al la ĝusta loko, kaj per grandegaj leviloj oni metis ilin precize tien, kie ili devas kuŝi. Herodoto certe ne troigis, kiam li rakontis, ke 100.000 sklavoj laboris dum 20 jaroj pri la piramido. La piramidoj venkis la tempon, sed tamen malaperis la glataj ŝtonoj, kiuj kovris la flankojn, kaj kiuj kaŝis la enirejon. Ili do aspektas alie ol kiam ili estis novaj, sed ili estas tre imponaj ankoraŭ nun.

### **2. La pendantaj ĝardenoj de Babilono.**

**P**or admiri la duan mirindaĵon, ni forlasas la valon de Nilo, kaj iras al Eŭfra-

to. Enpense ni retroiras 2500 jarojn, ĉar ĉi tiu mirindaĵo ne plu ekzistas.

En Babilono regis reĝo Nebukadnecaro, kiu pligrandigis sian regnon kaj plibeligis sian urbon. Li edziĝis kun iu princino el Medio, kiu tre sopiris al sia patrolando. Por plaĉi al si, Nebukadnecaro igis aranĝi por ŝi belegan parkon, kiu nomiĝas 'Pendantaj Ĝardenoj', kiuj memorigis ŝin al la arbarkovritaj montoj de Medio.

La parko estis kaj larĝa kaj longa 125 metrojn kaj estis terase aranĝita, kiel grandega ŝtuparo. Fakte la parko ne estis 'pendanta'. Ĝin subtenis kolonoj, kiuj estis po 25 ĝis 100 metrojn altaj, simile al tuta arbaro. Ili staris dense, tiel ke ĉiuj povis porti ŝtonojn de 5 metroj. Ĉi tiuj ŝtonoj formis super belega ĉambro tegmenton, kiu estis unu metron dika. Oni metis sur la ŝtonojn tavolon el humo tiom dikan, ke eĉ grandaj arboj povu kreski tie, kaj ke la akvo ne tragutu. En la senpluva sezono oni devis akvumi la kreskaĵojn.

Sur la plej supra teraso estis grandega akvujo, al kiu iu maŝino alportis la akvon el Eŭfrato. El la akvujo oni kondukis la akvon tra la tuta parko, ne nur por la kreskaĵoj, sed ankaŭ por la fontanoj.

La ĝardenoj aspektis kiel montaj deklivoj, kiuj estis belegaj kaj imponaj, kiam oni ilin rigardis de malsupre. De supre oni havis belegan superrigardon de la urbo, rivero kaj ĉirkaŭaĵoj.

### **3. La templo de Artemiso en Efezo.**

**A**rtemiso estas la greka nomo por la diino Diano. Ŝia unua sanktejo en Efezo estis nur tre mizera, laŭdire nur kava arbo, en kiu staris ŝia statuo. Filo de la lasta reĝo de Ateno fondis la unuan veran templon por Artemiso. Tamen pasis an-

koraŭ 5 jarcentoj, antaŭ ol oni kapablis konstrui templon, kiu imponis ne nur pro siaj grandegaj mezuroj, sed ankaŭ pro beleco. Oni komencis la konstruadon en la mezo de la 6-a jarcento antaŭ Kristo. Oni ne kuraĝis konstrui sur roka tero pro timo je la tertremoj, kiuj tie ofte okazis. Tial oni elektis marĉan terenon.

Nun estis la danĝero, ke la konstruaĵo povus malsupreniĝi, do oni plenigis la terenon per lignokarbo, kiu estis bone premita kaj kovrita per haŭtoj. Oni opiniis, ke tiel la fundamentoj estos sekuraj kaj la mola grundo eltenos eĉ la plej gravajn tertremojn.

Nun pri la konstrumaterialoj. Kompreneble oni uzos marmoron. La plej bona speco estis tiu de la marmorinsulo en la Marmora Maro. Ankaŭ la insulo Paroso liveris belan marmoron. Sed ambaŭ okazoj postulus longan marvojaĝon. En la urbo oni interkonsiliĝis pri la problemo.

En tiuj tagoj la paŝtisto Piksodoros paŝtisian brutaron en la montoj je 8000 paŝoj de la konstruterenon. Du virŝafoj ekbatalis. Unu mistrafis kaj puŝis tiom forte pro siaj kornoj kontraŭ la rokon, ke granda peco defalis. Piksodoros vidis la koloron. Ĝi estis brile blanka kaj li kuregis kun la rokpeco al la urbo, kie kunvenis la konsilantaro. La peco de la roko montriĝis belega marmoro. Piksodoros ricevis ne nur grandan rekompencan, sed krome, la rajton nomi sin estonte 'Evangelos'. Tio estas *Alportanto de ĝojiga Komunikado*. Sur grandega piedestalo, longa 125 metrojn, larĝa 73 metrojn, staris la statuo de la diino, ĉirkaŭita de duobla vico de kolonoj, altaj 19 metrojn.

La templo estis preta, 400 jarojn antaŭ Kristo, sed forbrulis duonan jarcenton poste.

Iu viro el Efezo ekbruligis ĝin. Vane li estis klopodinta fariĝi fama, kaj per ĉi tiu fiago li atingis, ke lia nomo estis konata. Malgraŭ la fakto, ke estis malpermesate elparoli lian nomon, ni scias, ke estis Herostrato kaj tiun famon ni ankoraŭ nun nomas Herostrata fameco.

La makedona reĝido Aleksandro militiris al Azio kaj dum tiu militiro li akiris la nomon Aleksandro la Granda. Li venis ankaŭ en Efezo, kiu kapitulaciis. Li oferis pagi la rekonstruadon de la nova templo, kondiĉe ke lia nomo staru sur ĝi, sed la efezoj rifuzis kaj tuj ili mem komencis la laboron. La nova templo ne fariĝis tre granda, ĉar ĝi estis preta antaŭ ol Aleksandro mortis. Kaj la kostojn oni povas pagi per la juveloj de la virinoj el Efezo. Kvankam la malnova templo estis fama pro grandeco kaj beleco, la nova estis multe pli fama pro belegaj ornamaĵoj. La plej bonaj skulptistoj kaj pentristoj el Grekio prilaboris ĝin. La eksteraj kolonoj estis kovritaj de skulptaĵoj. Ĉi tiu konstruaĵo restis pli ol 600 jarojn, kiel unu el la plej belaj memoraĵoj pri tempo kaj popolo, kiuj amis la belecon. En 262 p. K. ĝi ruiniĝis kaj la restaĵoj malaperis kaj parte estis uzataj en privataj loĝejoj.

#### 4. La statuo de Zeŭso en Olimpio.

Tiu ĉi statuo estas kreaĵo de la fama greka skulptisto Fidio. Post la heroo milito kontraŭ la persoj, komenciĝis por la grekoj prospera tempo. Periklo, kiu regis tiutempe, multe plibeligis Atenon kaj la aliaj urboj tion imitis.

La skulptisto Fidio estis la plej fama el ĉiuj artistoj. Estis li, kiu kreis la grandan statuon de Atena por la Partenono. Ĝi estis farita el eburo kaj oro. Sed ĝi estis apenaŭ preta, kiam oni kulpigis lin pro ŝtelado de la oro. Montriĝis ke li estis senkulpa. Post tiu ofendo li forlasis Atenon kaj iris al Olimpio, kie li kreis la statuon de Zeŭso. Li alvenis en Olimpio kun granda sekvantaro de artistoj kaj metiistoj, kiuj devis helpi lin. Oni konstruis por li domon, kie li povos loĝi kaj labori.

La statuo de Zeŭso estis 15 metrojn alta. La dio Zeŭso sidis sur trono el eburo kaj eburo, riĉe ornamita per oro kaj juveloj. La figuro de la dio konsistis el oro kaj eburo. En la dekstra mano ĝi tenis virinan figuron, kiu prezentis la venkon, kaj en la maldekstra mano sceptron. La tuto staris sur nigra marmoro kaj se la ĉielo malhelbluis, ĝi vere estis tre impona.

Kiam la statuo pretis, la majstro ekstaris antaŭ ĝi kaj preĝis al Zeŭso, ke li donu signon de kontenteco. Kaj ... jen la fulmo trafis la teron, precize tie, kie la statuo plej bele videblis. Ankaŭ tiun mondmirindaĵon detruis la gotoj.

## 5. La tombo de reĝo Maŭsollos

**E**n la sudokcidenta parto de Malgranda Azio situis la urbo Halikarnassos. Tie loĝis la reĝo Maŭsollos kun sia edzino Artemizio. Li estis prudenta kaj kuraĝa kaj tiom riĉa, ke li povis elspezi multe da mono por la plibeligado de sia urbo.

Al unu el la multaj artistoj en sia kortego li komisiis konstrui monumenton, kiu estos samtempe tombo kaj memoraĵo por li kaj lia edzino. La plej bonaj skulptistoj el Grekio ekkonstruis, sed la reĝo mortis en 352

antaŭ Kristo. La edzino daŭrigis la konstruadon, sed ŝi morti du jarojn poste. Tamen la artistoj finkonstruis la monumenton, ĉar ili nun sopiris vidi ĝin preta. La konstruaĵo estis kvadrata, ĉirkaŭita de kolonoj, inter kiuj staris statuoj. Je la anguloj staris Rajdantoj kaj supre sur la tegmento durada militĉaro kun kvar ĉevaloj. En la ĉaro staris la reĝo Maŭsollos kaj lia edzino.

En 1402 la Johanitaj kavaliroj uzis la ŝtonojn por la konstruado de fortifikaĵo. Poste oni malkovris subteran ĉambron kun multaj kolonoj kaj multkoloraj muroj. Tra koridoro oni venis en malpli grandan salonon, kie staris sarkofago el belega marmoro kun surkovrila kasko. Oni ne havis ilojn por malfermi ĝin kaj reveninte la sekvan tagon oni konstatis, ke dum la nokto ĉion forŝtelis rabistoj. Statuo de reĝo Maŭsollos kaj la vorto 'maŭzoleo', kiun ni uzas por tre granda tombo, estas la solaj memoraĵoj.

## 6. La koloso de Rodiso

**S**ude de Halikarnassos situas la insulo Rodiso, kie oni kulturis vinberojn kaj aliajn fruktojn. Ĉar la arbaroj liveras bonegan lignon por la ŝipkonstruado, la insulo fariĝis pli kaj pli riĉa kaj la popolo pli kaj pli potenca.

Ili ŝatis statuojn, prefere tre grandajn. Onidire la insulo havis 3000 statuojn, inter kiuj centoj de grandegaj. La plej konata estas la Koloso de Rodiso, la statuo de sundio.

Ĝin faris la skulptisto Chares kaj ĝi staris ĉe la enirejo de la haveno. Ĝi estis 37 metrojn alta kaj kostis grandegan monsumon. Oni bezonis 12 jarojn por ĝin

muldi kaj starigi. Post 56 jaroj ĝi detruigis dum tertremo.

La roma historiisto Plinio, kiu vivis kelkajn jarojn post Kristo, rakontis, ke la statuo estis tiom impona, ke oni apenaŭ povus ĉirkaŭbraki la dikan fingron kaj ĉiu el la aliaj fingroj estis pli granda ol ordinara statuo.

Laŭlegende la skulptisto Chares antaŭe faris modelon de la duona grandeco, kalkulis la kostojn de ĉi tiu, kaj postulis la duoblon por la statuo, kiu estos duoble granda.

Kiam estis jam tro malfrue, li konstatis eraron en sia kalkulado, ĉar por statuo de duobla grandeco li bezonos okoblan kvanton da metalo. Pro malespero por la perdo li sin mortigis.

Poste oni bezonis 900 kamelojn por transporti la pecojn de la koloso. Ni ne scias, kiel aspektis la statuo. Iu franco opiniis, ke ĝi servis kiel lumturo, enmane portis pelvon kun brulanta oleo kaj ne staris ĉe, sed trans la haven-enirejo, tiel ke la ŝipoj veturis trasube.

## 7. La lumturo sur Faroso.

**N**i reiras al Egiptio. Kiam Aleksandro la Granda dum sia militiro venis en tiun landon, li volis konstrui havenurbon. Li songis, ke li renkontas iun viron, kiu citis por li la verson de Homero: "En la moviĝema maro, transverse antaŭ la enmariĝo de la rivero de Egiptio, situas malgranda insulo, meze en la marondoj. Oni nomas ĝin Faroso. Tie estas bonega haveno!"

Laŭ tiu konsilo oni fondis la urbon Aleksandron kaj sur la insulo Faroso la lumturon konstruis Ptolemeo, la sekvanto de Aleksandro.

La konstruinto nomiĝis Sostratoso kaj onidire Ptolemeo tiom ŝatis lian laboron, ke li permesis al Sostratoso meti sian nomon sur la lumturon. Aliaj opinias, ke la reĝo volis havi sian propran nomon sur la lumturo. Kio okazis? La konstruinto metis la nomon de la reĝo en la kalktavolon, sed kiam aerdisiĝis tiu tavolo, montriĝis, ke en la pli fortika ŝtono staras la nomon 'Sostratoso'.

Oni rakontas, ke Sostratoso ĵetis vitron, ŝtonon, brikojn kaj ĉiajn metalojn en la maron, por ekzameni la influon de la akvo.

Kiam tiuj materialoj estis prenitaj el la akvo, montriĝis, ke nur la vitro ne ŝanĝiĝis. Tial li elektis grandajn masivaĵojn el vitro por konstrui la fundamenton.

Kelkaj diras, ke la lumturo estis 272 metrojn alta. Sed tio ne certas. Multajn jarojn poste komunikis la araboj, ke tiam la ruino estis alta 147 metrojn.

En la malsupra parto de la turo estis konstruita vojo, kiu iom post iom supreniris kaj laŭ kiu supren transportis ĉevaloj kaj veturiloj brulmaterialojn. En la supra parto estis ŝakto, tra kiu oni ilin transportis per takelo.

Oni diras, ke en la lumturo estis 300 ĉambroj, kie loĝis granda garnizono.

Kiam la turo ankoraŭ havis sian tutan altecon, en la supraĵo por gvidi la ŝipistojn brulis granda fajro. Laŭdire ĝi ankoraŭ funkciis kiel lumturo en la 12-a jarcento. Fine en 1375 dum tertremo la lumturo detruigis.

Ni ne scias, kiam ĝi tute malaperis, sed eĉ nun francoj nomas la lumturon *phare*, italoj kaj hispanoj diras *faro* kaj angloj *Pharos*.

## Contributie afdeling Groningen-Drente

<b>Afdelingslid</b> (incl. abonnement LA VERDA STELO)	€ 11,34
<b>Gezinslid</b>	€ 5,67
<b>Donateur</b> (minimaal)	€ 5,67
<b>Abonnement LA VERDA STELO</b>	€ 5,67

Over te maken op Postbanknr. **3822472**  
ten name van afd. Groningen, Esperanto Nederland te Bedum



Leden van afd. Groningen-Drente worden geacht lid te zijn van  
ESPERANTO NEDERLAND.

Vandaar dat wij hier ook het gironummer ervan vermelden:  
Postbanknr. **375522** ten name van  
ESPERANTO NEDERLAND te Heerhugowaard

## Lidmaatschap ESPERANTO NEDERLAND

<b>Lid</b> (incl. abonnement Fen-X)	€ 25,00
<b>Gezinslid</b>	€ 7,50

Esperanto-klubo GRONINGEN-DRENTE  
T.W.S. Mansholtstraat 25  
9728 MC GRONINGEN



ESPERANTO - *taal zonder grenzen*